



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 72 • UEA virtuale • Hungario • Serbio • Kongo DR < **decembro 29**

AMO 96 – unuaj rezultoj el la Afrika Kongreso

Bedaŭrinde ne alvenis la raporto, petita de pluraj homoj en kaj ekster la Afrika Komisiono, celita al ĉiu tiu komenca loko. Do, tiu raporto transiros al EKO 2023.

La 3-a Virtuala plu vizitebla ĝis januaro

Escepte en 2022 UEA okazigis du kongresojn samjare. Sekve de la sukcesaj Virtualaj Kongresoj en 2020 kaj 2021, la Estraro iniciatis ĉi-jare samformatan kvar-tagan trian Virtualan Kongreson (VK3) en novembro, aldone al la UK en Montrealo. Pro la multaj aliaj okupoj de la estraranoj kaj de la teknika organizanto - E@I - la preparoj okazis relative lastmomente, sed la rezulto estis tre sukcesa. Nun tiu unika kongreso estas plu vizitebla **ĝis la fino de januaro**. Novaj VK-aliĝoj estas senpagaj kun membriĝo en UEA por 2023, kion eblas fari en la VK-aliĝilo: vk.esperanto.net/2022.

Aliĝis pli ol 1450 personoj kaj efektive partoprenis preskaŭ mil. La programo estis abunda kun pli ol 300 programeroj. Paralele okazis Retoso-2 de TEJO, kun 50 programeroj. Daŭre la aliĝintoj povos spekti la kongreson, ĉar la cent plej gravaj programeroj restos videblaj ĝis la fino de la jaro kaj poste estos videblaj en la jutuba kanalo UEA viva. Por re-spekti tiujn cent programerojn sufiĉas iri al <https://vk.retevent.com/programo?t=talks>. Plej popularaj estis la [Inaŭguro](#) kaj la [fermo!](#) de VK3, kiujn spektis realtempe pli ol cent personoj. Pluraj aliaj programeroj okazis vive, dum multaj aliaj estis reprojekciigitaj el la Montreala UK. Okazis du sesioj pri strategia planado kun vigla partopreno. Pluraj programeroj okazis en du malsamaj horoj por kuraĝigi al pli internacia partopreno. Malfermis la kongresan temon [prelego](#) "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj".

Riĉa estis la kultura programo. Eblas ĝui la muzikalon de TEJO "[June kaj kune](#)", la koncertojn "[Nokta ŝoforo](#)" de Yves Desrosiers kaj [Banĝo-Esperanto](#) de Armel Amiot registritajn en Montrealo, la teatraĵon "[Tempo Rabita](#)" de Luiza Carol, [kurson de parolarto](#) #forlaflato: lernu prelegi en dek simplaj paŝoj, la premio-ceremonion de la [INK-konkurso](#) kaj plurajn programerojn de TEJO serĉante la programon kun "[Retoso](#)".

Menciindas cetere la movada dimensio de la VK. Spektu interalie prelegojn [135-jariĝo de Hector Hodler](#): la valoroj de la fondinto de UEA por la nuntempo, [Lidia Zamenhof](#) - 80 jarojn post ŝia tragika pereco kaj informojn pri [senpagaj reklamoj](#), Dum

la VK okazis kunvenoj de kelkaj kontinentaj komisionoj, pri UNESKO (Festivalo por la paco en [Tolosa](#)), de la Akademio ([prezento](#) kaj [respondoj](#)) kaj "Babilu kun" pluraj estraranoj - [Duncan Charters](#), [Fernando Maia Jr.](#), François Lo Jacomo kaj [Amri Wandel](#).

Interalie estis remontritaj la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj de la Scienca Kafejo, okazintaj hibride kaj registritaj en Montrealo. Entute okazis en la VK3 14 sciencaj prelegoj. Por respekti la sciencan programon eblas serĉi en la program-platforno Retevent la eventojn "[IKU](#)" aŭ "[Kafejo](#)". Kadre de Retoso okazis [KonSciU](#) - Konkurso Scienca, dum kiu junuloj prezentis siajn esplorojn. Ankaŭ la fakaj asocioj kaj grupoj havis multajn eblecojn prezenti sin, kadre de la Virtuala Movada Foiro. Estis remontrita la [Faka Forumo](#) de Montrealo. Respektu ankaŭ la prelegon pri la agado de CED [Invit' al interlingvistiko!](#)

La Virtualaj Kongresoj estas la respondo de UEA al la post-pandemia mondo, en kiu virtualaj kaj hibridaj konferencoj plimultiĝas kaj ebligas partoprenon sen vojaĝi. Por la Eo-movado tio estas freŝa vento, kiu ebligas al multaj esperantistoj kiuj antaŭe ne povis tion fari, sperti internacian kongreson. Tiun direkton UEA planas estontece plivastigi per pli hibrida UK kaj okazigo de la VK ĉiujare. Por senpage ĝui aliron al la pli ol 100 programeroj spekteblaj, sufiĉas esti membro de UEA. Se vi ne estis aliĝinta al VK3, necesas aliĝi al UEA por 2023 (<https://uea.org/alighoj> aŭ per la VK-aliĝilo).

Poema legado en Ĉinio

Instruistinoj de Elementa Lernejo Baiyangshujie en urbo Taiyuan, Shanxi, Ĉinio, legas poemon el "La Stranga Butiko" de Raymond Schwartz, celebre al la fondiĝo de Weilun-muro kaj memore al la 163-a naskiĝtago de Zamenhof. "La Stranga Butiko" estas unu el la du verkoj rekomenditaj de ILEI por la Internacia Tago de la Esperanta Libro 2022. La tekstoj kaj iliaj enkondukoj elŝuteblas senpage el la retejo de ILEI: <https://www.ilei.info/novajxoj/Tago-de-la-Esperanta-Libro.pdf>

[Elementa Lernejo Baiyangshujie: Zamenhofa Tago 2022](#)

Alessandra Madelli, ILEI

Lusin pri kontraŭmilitemo

La Itala samideanino Claudia Maggi legas por ni la novelon "Antimilitisto" de la fama ĉina verkisto Lusin (Lu Xun). ILEI proponas ĝin por la Internacia Tago de la Esperanta Libro/Zamenhofa tago. La tuta teksto senpage elŝuteblas el:

<https://www.ilei.info/novajxoj/Tago-d...>

<https://www.youtube.com/watch?v=tBrq2-SLuGQ>

Hungara historio de la lastaj jaroj

Kun ĝojo mi informas vin, ke la informmaterialo estas finkonstruita, kiu prezentas kiel daŭrigo la riĉajn agadojn de la Asocio por la movado ekde 2017 ĝis 2022, ilustritajn per fotoj. Dankon por la memboj de la laborgrupo, kiuj donis sindoneman helpon en la efektivigo de mia ideo kaj senlace kunlaboris kun mi. Akceptu ĝin kun amo. Mi deziras al vi feliĉan legadon kaj pripensadon. La esperantlingva Informilo [legeblas ĉi tie](#).

Johano Nagy, ekonomia vicprezidanto de HEA,

Projekto 'Erasmus klarigita filme

<https://youtu.be/GVPqCwiUKJU>

Laura Brazabeni

Slovenoj informas

Bonvolu trafolumi la alkroĉitan novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj* 2022/4 (decembro). Ĉiuj numeroj de la bulteno estas je dispono per la ligilo:

<http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>.

Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL

Sentema kunvenigo en norda Serbio

Meze de decembro 2022 okazis la 32-an fojon la tradicia renkontiĝo de esperantistoj en Senta (norda Serbio). La ĉeftemo de la ĉi-jara evento estis doktoro Bela BURANJ, kuracisto, epidemiologo, etnologo kaj sociologo el Senta.

Vendrede, la 16-an de decembro, en la ĉefa poŝtoficejo en Senta oni uzis memorstampilon pri d-ro Bela BURANJ dum la tuta tago. Sabate, la 17-an de decembro, en



la ejo de la E-Societo (Senta, strato Glavna 15) okazis la ĉefa evento kun la sekva programo: raporto pri la vivo kaj laboro de d-ro Bela BURANJ, poemdeklamo kaj laŭtleĝo de anekdoto el la kolektaĵo de d-ro Buranj, muzikaj numeroj kaj prezento de la agado

de SEL (Serbia Esperanto-Ligo) kaj de la E-societo "Tibor Sekelj" el Subotica (norda Serbio). La ĉeforganizanto de la renkontiĝo estis Ilona KAJARI, sekretario de la Societo. La eventon finance subtenis la urbo Senta.

Raportis: Aranka LASLO

Serba informado tra nemovadaj instancoj

„**Esperanto – lingvo por ĉiuj**” estis la titolo de la prelego por neesperantistoj, okazigita la 16-an de decembro 2022 je la 18-a horo, en la urbo Vršac (Serbio), okaze de la Zamenhof-tago. La organizantoj de la evento estis neesperantistaj organizaĵoj: Asocio de Blinduloj kaj Vidhandikapuloj de Suda Banato kaj „Taĉka susretanja” („Punkto de renkontiĝo”) – Asocio por la Promocio kaj Rekono de Kulturo, Scienco kaj Arto. La ĉeforganizanto de la evento estis Lorijan POPI (prezidanto de la Asocio de Blinduloj kaj Vidhandikapuloj de Suda Banato, E-kursano de SEL (Serbia Esperanto-Ligo)).

LIBE kaj SEL aktivis en Serbio

Prelegis: **Nedeljka LOŽAJIĆ**, prezidanto de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj), kaj **Jovan ZARKOVIĆ** – prezidanto de SEL (Serbia Esperanto-Ligo). Nedeljka kaj Jovan serblingve **prezentis la planlingvojn ĝenerale, kun speciala mencio de Esperanto kaj ĝia movado**, kun muzika intermezo (kanto kun gitaro – Nedeljka). La eventon partoprenis dekkvino da partoprenantoj.

Raportis: Aranka LASLO. Fonto de la fotoj:

<https://www.facebook.com/media/set/?vanity=tackasusretanja&set=a.613122504101253>

Denova kurso Ĝenova

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Corso di Esperanto livello A1

Gvidantonomo: PATRICK MORANDO

Tipo: Nova movada kurso

Loko: GENOVA, Italio

Aldoninto: Patrick75

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27495>

Agado en la ne tro paca urbo Goma

Ĝoje ni en la Eo-klubo de Goma, ANF-anoj festis la Zamenhof-tagon kaj kristnaskon kun niaj prizorgataj georfoj, ni bondeziras al vi ĉiuj. Rememorigante al vi, momente ni



daŭre urĝe bezonas helpon por pagi la lernejajn kotizojn por la subtenataj georfoj niaj . La manko de tiu mono ekigis forpeladojn el la lernejoj. Do kiel ĉiam ĉiu monero bonvenas! Ni agadas en la urbo Goma kaj kontakteblaj je [orfojkongo@gmail.com!](mailto:orfojkongo@gmail.com)

Augustin Kakozwa

===== vortoj: 1270 =====

La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informo vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.